

Yi Qiao (ĉino en Germanio)



Se vi havas

Se vi havas revon en la koro,
kial ne malkaŝas ĝin fiere?
Realigu l' revo kun honoro,
kaj l' diino benas vin prospere.

Se doloron havas vi en koro,
kial ne konfesas ĝin sincere?
Ŝi karesu l' vundon kun favoro,
tiel sentas vi vin kor-libere.

Se vi havas amon en la koro,
kial ne ĝin fandas kun la ŝia?
La homar' progresu al aŭroro,
regos fine l' mondo harmonia.

Kiel la lumtur' en nokt' obskura,
ŝi prilumas nin kun grac' am-pura..

La printempa vento

Kiam vent' printempa flirtas mole,
kiel spiro dolĉa trans gazono,
papilioj ŝvebas jen petole,
dum abeloj zumas sur burĝono.

Kiam vent' printempa nun susuras,
kiel spir' aroma tra la valo,
jen narcisoj dense hel flav-puras,
kantas melodie najtingalo.

Kiam vent' printempa tra la tero,
kiel spiro freŝa ĉion vekas,

rojoj fluas lirle en libero,
paŝtataro vagas dum ŝafblekas.

La printempa vent' fariĝu beno,
land' beata estu hom-edeno!

Posttagmeze de printempa tago,
sur la benk' meditas mi plezura.
Salikvergoj flirtas super lago,
nuboj flosas sur ĉiel' lazura.

Preter mi susuras briz' leĝera,
mi la for-drivant' nubon gvatas.
Diste jen en tranc' kun sent' tenera,
reen al l' epok', mi kiun ŝatas.

Mi restartas laŭ l' juneca vojo,
kun pasia ard' de fid' fiera.
Viv-aŭroron vidas mi kun ĝojo,
ĉio en fruĵaro ja prospera.

Mi re-sobras nun per birda kvero,
spir' printempa vervas kun espero.

Printempa tago

Posttagmeze de printempa tago,
sur la benk' meditas mi plezura.
Salikvergoj flirtas super lago,
nuboj flosas sur ĉiel' lazura.

Preter mi susuras briz' leĝera,
mi la for-drivant' nubon gvatas.
Diste jen en tranc' kun sent' tenera,
reen al l' epok', mi kiun ŝatas.

Mi restartas laŭ l' juneca vojo,
kun pasia ard' de fid' fiera.

Viv-aŭroron vidas mi kun ĝojo,
ĉio en fruĵaro ja prospera.

Mi re-sobras nun per birda kveroj,
spir' printempa verbas kun espero.

Medito pri l' antikveco

Ĉe bord' de l' Rejno staras l' Urb'
Ksanteno*,
Kolonoj jen nubtuŝas pri l' Haveno**.
Neptuno gardas navigad-sekuron,
Merkuro spronas komercad-kulturon.

Oferfajro iam ardis hele,
Preĝis la pilgrim' fidele.
Mi meditas pri la antikveco,
Rom' antikva restas kun glordeco.

. * Ksanteno (germane: Xanten) estas la antikva Roma urbo ĉe la bordo de la Rejno (germane: der Rhein), Germanujo. ** Temas pri la tiea Havena Templo (germane: Hafentempel). — de Yi Qiao

La kreado (Kampo verda)

La kampo nun kun freŝa verdkoloro,
sin sternante al l' okulo plaĉas.
Per alloga flortrezoro,
l' aspekt' gracia as plialtigita.
Herboj balzamumas kun aromodoro,
ĉi tie l' vundoj as resanigitaj.

Tiuj branĉoj as fleksitaj
kun la ŝarĝo de fruktvaro ora;
Ĉi tie l' forsto jen arkiĝas
kiel la ombrelo freŝfavora;
La kruta monto as kronita
kun arbaro densa kaj fervora.

Tradukis laŭ la kanto

— *Liriko: Gottfried van Swieten (1733-1803)*

Muziko: Joseph Haydn (1732-1809)

Soprano: Edith Mathis

La Kolombo

Unu kant' rememorigas tagon al mi,
kiam mute dum la sunsubir' forlasis ŝi.

Kun malĝoja kanto ŝi foriris vage,
la soleco akompanis min tuttage

Kolombo blanka kantas al mi ĉe fruĥor',
pri melankolio olda en anima spleno.
Ĝi jen venas kun silento de mateno,
mi eliris vidi kaj ĝi flugas jam for.

Kien flugas ĝi ĝis mia laŭtvokado
ne plu povas esti aŭskultebila?
Kien flugas ĝi dum mi sur morna pado,
ĝis ŝi ne plu as spurebla?

Se reveni volus ŝi,
ŝin atendi povus mi;
ĉiutage al la sekv-mateno,
por ke povu ami ŝin en pleno.

Tradukis laŭ la kanto

— *Liriko: Julio Iglesias, Muziko: Sebastián de Yrasier*

Tenoro: Julio Iglesias

Rita Mkrtĉjan (Armenio)



Atendado de printempo

La vintro ne rapidas adiaŭi,
Ĉiama gasto, ĝi aperas unu foj' en jar',
Kaj kiel vojaĝantoj ni atendas
En stacidomo, en malvarma hal'.

La trajno de printempo ne rapidas
Konata necertec' alvokas nin,
Denove ripetigās renaskiĝo de naturo
Eterna voj' de tempo kaj de nia viv'.

Ne eksciu iam alvenantoj
La tagojn de malsato, nigrajn jarojn,
Alvenu kaj foriru homoj kiel mi,
Nur kun la mond' okazu ja neni'.

Ekfloru kampoj en printempo
Kaj restu ĉiam juna nia viv',

Alvenu kaj foriru homoj kiel mi,
Sed kun la mond' okazu, ja, neni'.

Neniam tondru apud domoj, pordoj
La eksplodiloj katastrofaj,
Alvenu kaj foriru homoj,
Neni' okazu kun la mondo!

La volo senhezita de nacioj
Disŝiru buŝon de la morto,
Alvenu kaj foriru homoj,
Neni' okazu kun la mondo!

Virino estas forta uragano,
Malvarmo, pika glaciet',
Virino estas monta akvofalo
Ŝi estas vintra neĝovent'.

Virino estas tago nubkovrita,
Ŝi estas furioza mar',
Nekomprenebla kiel sonĝo, kosmo,
Danĝera kaj mirakla kiel fajr'.

Virino , estas vera kataklismo,
Sed... Post tuŝet' karesa de printemp',
Virino iĝas flubruet' de rivereto,
Ŝi estas floro, pepas kun birdet'.

Virino iĝas brila sunradio,
Dancanta papilio iĝas ŝi,
Ŝi estas stelo, fora kaj proksima,
Ŝi estas amo, estas mond' por ni!

Hundo

Kial hund' tiel fidelas,
Kaj la am' senlima estas?
Sed okuloj nur demandas
Ĉu la majstro same amas?

La kial' eble en tio,
Ke batadis hundon iu,
Aŭ ĝi en kaĝo vivis,
Aŭ hom' ofte perfidis.

Vagas mi kaj enigardas
La vizaĝojn, kion fari,
Mi atentis ĉion, por
Kiel hundo ne erari.

*Tradukis laŭ V. Gaft - fama rusa aktoro, poeto,
verkisto*

Mikaelo Bronŝtejn (Rusio)



Sezonoj

*(Por la Tago de geamantoj jen mia
tre antikva kanteto)*

Kun pluvo paŝas en la strat'
post tago tag', monato post monat'.
Mi triste ronkas en fotel' –
televido kaj botel'
estas vera bagatel'.
Vespera frosto, neĝa krak' –
denove paŝas post la tago tag',
kaj en sopiro revas mi,
ke subite venu vi
kaj ridetu tie ĉi.

Rf. En sopir', dum atend'
min varmigas via sent',
via man', via rid',
via plora ĝisrevid'.
Se knabin' kun obstin'
ankaŭ vi atendas min,
do, en ĝoj' kaj feliĉ'
venos nia renkontiĝ'!
Sub la karesa suna bril'
rapide rajdas tagoj en april',
sed mi enuas en piknik' –
dum balbuto de kalik'
pensas nur pri vi, amik'.
Kaj forta vin', kaj dolĉa kis'
donace pretas ie en valiz',
kaj la renkonta laŭta kri',
kaj ĉi tiu melodi'
estas pretaj nur por vi!

1977

Mi konfesu al vi kun sincer', ve,
kuirata en supo de l'nuno

ne scipovas mi plu agi verve,
sed senago por mi estas puno!

Do spirante l'humidan aeron
staras mi nun ĉe la vazistas', kaj
kribre serĉas konvenan aferon
por la kap' inter planoj kaj taskoj.

En la densa nebulo de l'tago
reliefiĝas penseto, ke mi jam
ion kaptis, do pretas al ago.
Kaj mi prenas papuran folion.

En mia kutima rutina medio,
En mia profunda neĝego arbara
Mi nun kun plezuro meditas pri tio,
Ke vivas mi jam en la tag' februara,

Ke venos rapide la ĝojo degela,
Ke la sunradioj descendos milsage,
Kaj mia printempo forlogos min de la
Rutino – por kanti kaj ĝoji ekvage.

La kurta reveno de l'vintro.
La arboj en neĝa deĝoro.
La neĝa hararo de l' viro,
paŝanta sen vintro en koro.

La revoj, vagantaj en blanko.
La sentoj, bolantaj en sino.
La viv' kiu daŭras kun danko
al la malavara destino.

Antaŭ jaroj, harplektantaj
sin en dikajn jarodekojn,
mia barbo estis nigra,
kaj ŝi amis min sincere.
Nun kovarde la spegulo
montras blankon – miajn pekojn,
kiuj farbis la hararon
en koloron neĝan.
Se re-
akironte intan nigron
per la farboj plej efikaj,

mi enmonde ŝin retrovos -
ne por penti plore, tamen
por genuojn miajn klini
kun admiro antaŭ ŝi kaj
la rigardojn interplekti –
ĉu resonos la iam' en

ŝia koro, forgesinta
l'barbon, benon de l'brakumoj,
kaj senfinon de l' tenero,
radiantan en rigardo,
aŭ senzorga ver' malkovros
trompon per penetraj lumoj,
kaj ne venos en okulojn
eĉ glimet' de l' inta ardo?

La februaro flegma kaj flegata,
de panjo-vintro filo la plej juna
paŝetas pace laŭ plenplena pad' da
neĝeroj pufaj en la tago suna.

Subiĝis flekse branĉoj de l'arbusto
al vintra povo, al la neĝa prem', do
flekŝiĝas ankaŭ mia dors', sed brusto
jam reve kaptas spiron de l'printempo.

Dum ĉeesto de neĝo,
dum foresto de mono
tamen sentas min reĝo
mi kun firma sindono
al la rondo amika
ĉirkaŭanta eĉ vintre,
al sincero senŝminka,
kiun mia destin' tre
malavare ofertas
flanke de l'amikaro.
Daŭros tio, mi certas,
plu - de jaro al jaro.

Revenas virinaĉo-vintro
en morna marto,
ja cedas la printempa virto
al frosta mav', tro
kruela antaŭ la forfuĝo,

foriĝo nepra.
 Glaciiginta matenruĝo
 kun frid' penetra
 la koron lezas, aludante
 tuttagan triston.
 Mi ne plu povas pensi kante,
 kaj kreskas kriz' en
 animo mia, frostigite
 de l'vintra nuno,
 sed revas mi, la krizon spite -
 kaj jen la suno!

Ángel Arquillos (Hispanio)



Mi gapadas

Mi sidas sur brakseĝo
 Gapante vian ombron
 Dum via korp' forestas...
 En ĉi stelplena nokto.
 Mi timas la solecon
 Kaj la sinuan sonon
 De la trumpet' arĝenta...
 Ludanta mian sorton.
 Sidanta sur brakseĝo
 Mi sentas, ke la koro
 Batas kun maltrankvilo
 Kaj hezitema movo.
 Mi sidas kun timemo
 Retenante larmetojn,
 Ĉar mi vivas la vivon
 Per vera sentimento.

Josip Pleadin (Kroatio)



Ekzistas ie kaŝita loko

Ie en fundo de mia koro, ekzistas eta kaŝita
 loko
 por renkontoj, revoj kaj fantazio tute
 realkolora,
 por arto, sopiro, mistiko kaj interkultura ŝoko,

en kiu vi belas kiel greka statuo el ŝtono
 marmora.

Via togo el blanka silko, viaj laktecaj mamoj
 sub ĝi,
 viaj gamboj longaj, kaj la statur' cervine
 eleganta,
 viaj ŝultroj molaj kaj via elasta malvasta tali',
 al mia kaŝloko venas per paŝo malpeza kaj
 lanta.

Mi tie avide trinkas el via puto, el lipoj kaj
 kortrezor'
 kvazaŭ veninta el am-Saharo, sen-ina kaj seka
 dezert'.
 Dum sage mian koron celas la di' de amo, la
 dio Amor',
 vi vartas min per inspir' edifa kaj dolĉe rava
 spert'.

Kaj bridas vi rapidon mian, min metas al
 honoraltar'
 vi portas min al stelaj altoj, kaj gvidas tra
 ĝarden'
 en kiu aŭdiĝas tintiloj kaj sono tranĉa de
 fanfar'
 dum min okupas ĝuosent', dum min okupas
 dolĉa sven'.

Nicolino Rossi (Italio)



Printempa ekvinokso

Ĉi senreviĝo
 mensa la tempon vipas.
 Vibras amriĉo,
 ĉar la martaj burĝonoj
 vivon prisimfonias.

La pluvtiktako
 printempa kape kugas,
 grincas ostvrako.

Ulcer' kancera
 ĉe nia vivkulmino.
 Cis la ravino
 haladzas rubaj plasto
 kaj birdoj agonias.


Kapeton montre
 lacerto flavoreas –
 mise ni veas.

Vibroj aprilas
 florbrile, birdotril...
 ĉerkoj plu milas.

Se April' verdas,
 Majo jam florabundas
 sed homaj mavo
 nian Teron inundas...
 Esperon ĉu ni perdas?

*Premiita en Konkurso EKRA 2021- Razgrad
 (Bulgario)*

Ryszarda Kwiatkowska (pollando)



Printempo

Printempo venas ĉirkaŭ la mondo
 la vento plektas ŝiajn teksaĵojn
 salutas la matenon kun rideto
 vekas la arbojn per sia spiro
 iras man' en mano kun marto
 kantas la kanton de la vivo
 ŝi disvastigas florojn
 vekas herbojn kaj arbojn

Marto enlitiĝos malfrue
 li hakis arbojn en la fruktoĝardeno
 ĝi ankoraŭ ne estas en la saŭco
 Mi pensas, ke li havas muŝojn en la
 nazo

ĉar lia vizaĝo estas nebuligita
 kvazaŭ li pensis pri ŝtormo
 kvankam mi ankoraŭ dormas
 li jam alportis cikoniojn

li havas alaŭdojn en la poŝo
 li konservis ilin ekde aŭtuno
 kalkulante anasojn sur la laĝeto
 pensas kie estas la gruoj
 estas ankoraŭ tiom da laboro por fari
 kelkajn pluajn tagojn
 por ke la floroj vekigu
 ili havis la forton por vivi

li kolektos la ceterajn foliojn
 li suferas pro soifo
 varmo faras la vivon pli agrabla
 momenton por ripozi
 do ili sidas sur la herbo
 en la suno kun kafo .

En Printempo – nova sento,
 Espertempo, milda vento.
 La unua renkontiĝo
 Ĉe la urba stratkruciĝo.
 Kafumado, babilado,
 En la parko promenado,
 Decaj tuŝoj, kis' senbuŝa
 La rigardo korkortuŝa
 Kaj subita aminklino
 Al flirtema blondulino.

En somero - la pasero
 Jam ne flugas en aero.
 Fojnaromo, ruĝa pomo,
 Nudaj korpoj de du homoj.
 L'amo venis ja, grandpaŝe
 Ili ne plu vivas kaŝe.
 Pro pasio, amligitoj
 Ŝatas resti en la lito
 Kaj karesi sin senĉese
 Parolante nur kapjese.

En aŭtuno – pala suno.
 Amant' rolas en tribuno.
 Amantino lin atendas,
 Pri soleco ofte plendas.
 La konsolo - belaj floroj,

Ne sufiĉas por la koro.
Dum la arboj senvestiĝas
L'am' en koroj malfortiĝas.
Sur la vitroj pluvmuziko,
Ĉio ŝajnas artifiko ...

Ofte gustas kiel cindro
Retrospekto en la vintro.
Akraj vortoj kaj riproĉoj
Ne plu milde sonas voĉoj.
Dom' sen amo, brulodoro,
Venis frosto kaj doloro.
Nek en lito, nek dum manĝo
Eblas ia pacaranĝo.
En la kvara jarsezono
Venis fino sen pardono.

Laimundas Abromas (Litovio)



Ekhaltu, Homo...

Ekhaltu, homo, kial hastas vi?
Rediras vi, ke tempo mankas?
Malkaŝu do, sufiĉos kiam ĝi?
Ĉu mankos en la tombo ankaŭ?
Galope preterkuras nia viv'...
Do, haltu, ĝuu vi ĉi tagon...
Aŭskultu – flustras arboj ĉe dekliv',
Ondeton pelas l' ond' en lago...
Atentu – jen foliojn taŭzas vent'...
Vi spikojn grenajn tuŝu mane...
Radion sunan ĝuu sen atend'.
Ja vivo preteriros vane.
Ekhaltu.vi...
Ne diru plu, ke mankas temp' al vi,
Vi sciu, l' vivo malavaras.
Neniu scias, kiam mortos ni.
Do ĉiu vivotago karas.



Eugene Khvalkov (Rusio)



En la profundo de la arbaro,
sub steloj kaj lunlumo brila,
loĝas la sorĉisto
kun sia libro de sorĉoj.

Kun bastono de sorĉado,
kaj ĉapo de l' antaŭtempoj,
li kaptas la venton
kaj parolas kun la arbaro.

En lumero de la luno
kaj bruo de la nokta vento,
sekretaj vortoj kaj kantoj,
la sorĉisto estas kun la vento.

En la malluma nokto, sub la steloj brilantaj,
Dancas la ombroj, en ĉarmajn landojn ekzotaj.
Flustraĵoj de sorĉo, en la ventoj flugas,
La magio de la nokto, vojaĝo en la
malproksimon.

En profunda arbaro, kie la lumo malheliĝas,
Sorĉisto maljunega, sub la lian fojon reĝas.
Kun bastono en mano, kaj libro de misteroj,
Li vokas la spiritojn, de forgesitaj lokoj.

Vortoj kun potenco, en la aer' vibras,
Ili ŝanĝas la sorton, kie ĉio jam tremas.
Per simple frazo, mondon ni faras,
La magio en lernado, en l' koro ne palas.

Stellumo, en la nokto kuŝantaj,
Perdiĝas en ĝojo, kantas pri harmonio.
Ĉiu brilo magia, por ni en la ĝardeno,
Malfermas pordojn, al rajdantoj de mistero.

Rojaj krepuskoj, ĉielo en fajro,
Rivelo de magio, en ĉiu nova sono.

La tago foriras, tamen la magio restas,
En la koroj de tiuj, kiu okupiĝas pri beleco.

La maro flustras sekretojn, profunda kaj blua,
Ĝiaj ondoj dancas, sub la ĉielo pura.
Maristoj revas pri landoj foraj,
Kie sirenoj kantas legendojn gloraj.

La nokto etendas sian mantelon, mistera kaj
trankvila,
Steloj brilas hele, kiel ĉielo idilia.
Revoj vekiĝas, flosante en la aero,
Kaj ombroj dancas, sub la luno arĝenta kaj
sincera.

La amo estas rozo, delikata kaj fragila,
Ĝiaj petaloj molaj, sed dornoj estas viglaj.
Ĝi floras en niaj koroj, kun ĝojo kaj brilo,
Sed foje ĝi vundas, kun akra doloro.

Åke Näsholm (Svedio)



Vi levas min

Se tristas mi kaj lacas la animo,
se venas ĝen' kaj pezas mia kor',
senmove mi atendas en silento
ĝis venos vi kaj sidos apud mi.

Vi levas min ke staru mi sur monto,
vi levas min por ir' sur ŝtorma mar'.
Fortas mi, se ja sur via ŝultro,
vi levas min al pli ol povas mi.

Vi levas min ke staru mi sur monto,
vi levas min por ir' sur ŝtorma mar'.
Fortas mi, se ja sur via ŝultro,
vi levas min al pli ol povas mi.

Ne estas viv' – nenio sen malsato,
kor' batas lace per malperfektec'.
Je Via ven' pleniĝas mi de miro,
kun foja kred' ekvidi eternec'.

Vi levas min ke staru mi sur monto,
vi levas min por ir' sur ŝtorma mar'.
Fortas mi, se ja sur via ŝultro,
vi levas min al pli ol povas mi.

vi levas min al pli ol povas mi.



Hans-Georg Kaiser (Germanio)



Bani sin en lago

Ha, la akvo nin forlogas.
Tio ne laŭplanas.
Mi kaj Donjo kuras lagen.
Ni nin tuj ekbanas.


Ni demetas niajn vestojn,
restas nur la nudo.
Hop, la akvo ŝprucas, plaŭdas,
kia bela ludo.

Ni kuŝiĝas sur herbejo
en la suna helo.
Ie en la lagomezo
lumas blanka velo.

El la akvo kaptas aglo
karpon kun furoro.
En la alta nest' sur arbo
pepas idohoro.

Pro la ard' de sunaj kisoj
baldaŭ ni ekruĝas.
Ni nin sentas kiel kankroj,
en arbaron fuĝas.

Elena Popova (Bulgario)



Invito

Estas mi lunradio
voje malfruita,
en la akvo radio,
de l' sonĝo lulita.
En floroj mi radias -
donaco de l' Dio.
Estas mi bela revo
inter la nimfeoj.
Nimfo de l' rivero
gasti vin invitas.
Bal' - part' de nia rito
en palac' nia blanka.
Venu, kun mi festi,
Am' kaj rido ne mankos!

Luna magio

En verda herbejo
sonas koncerto
de griloj, invito — alvoko
pri amo. La griloj al la
steloj preĝas por
helpo, sed ili brilas
neatingeblaj, ili ne scias,
kio estas malĝojo,
ilia amo estas eterna.
Pro tio ili ludas
kaj dancas feliĉaj.
Revuloj, sorĉitaj
de la koncerto, revas
pri lunlumaj herbejoj,
kie la griloj dancas kun
siaj amatinoj.
La luno ridas feliĉe
kaj malgaje samtempe,

ŝi estas sola,
ŝi havas neniun,
kun kiu danci.
Kaj la homoj,
de sonĝoj portitaj,
flugas al la senfineco.
Mateniĝis kaj la koncerto
silentiĝis...

Folio deŝirita

Folio seka, deŝirita,
sub la arbo fleksita.
—Senutila! Senutila!... —
blovas vent' kolera.
—Ne malesperu!
Vi iĝos sterko
kaj nutros la arbojn,
la herbojn... —
flustris la Tero,
kun voĉo frostita.
—Lasu la venton blovu
malice, vi ĝin pardonu!
Ĝi estas sola... Trista...
Sed vi ne estu malbona!...

Jadranka Miric (Serbio)



Printempa tago

Printempo odore
ŝvebas tra aer'.
Sunradioj orkolore
tuŝas homojn, ekstere
en kafejĝardeno tenere .
Mia harar' flirtas
kiel ŝalo en mia mano,
kiel unua kiso virta,
Saluto neniam forgesita.
Koro saltetas de rido sincera
de laŭtvoĉo salutanta vin libera.



Erika Godó (Hungario)



La virino

Virino, vi estas eterna mirindaĵo,
vorto de amo, ĉiam tre bela estaĵo.
Kiel espero naskita en la tagiĝo,
en la printempa vento, magiĝo.

La magio de via bela rideto, mirinda,
kiu alportas feliĉan senton, admirinda.
Vi estas forta kaj mildeca samtempe,
en via koro estas libereco ĉiutempe.

Milda brakumo de patrino por infano,
donanta protekton kiel fortan fadenon.
Vi ridetas kiam eĉ tra larmoj foje,
tuŝanta trista en via koro unufoje.

Esti virino estas granda privilegio,
via ekzistado, plena de granda magio.
Fonto de saĝeco fluas en via animo,
vi estas zorgema por ĉiuj sen timo.

La printempa vento

La printempa vento blovas,
floroj floras, koloroj brilas.
La tero vekiga, la mondo reviviĝas,
naturo vivas, la herbejo verdiĝas.
Ĝi milde karesas inter la arbojn,
birdkanto sonoraj, ĝojo naskiĝas en koroj.
En milda brizo kaj la freŝa aero,
ĉio estas plena de nova espero.
La printempa vento blovas,
herbaj kampoj dolĉe dancas.
La floroj floras, la herbejo verdiĝas,
la rivereto kuras, la vivo renoviviĝas.
Tra arbobranĉoj ĝia flustro ĝuas,
kaj sub sunbrilo la naturo revuas.
Kun ĝia freŝeco, nova vivo inspiras,
ĉiuj homoj ŝatas ĝin kaj admiras.

La beleco de kokcinelo

Eta bela ruĝa kokcinelo flugas,
folioj, floroj ĝin ĉiam dolĉe tuŝas.
Sur ĝia dorso, sep nigraj punktoj,
sekretoj tenantaj, belaj anekdotoj.
Kokcinelo, komencas viajn vojojn,
viaj flugiloj briligas sunajn fojojn.
Dancante sur floroj kaj belaj folioj,
ĉielarko atendas en dolĉaj sonĝoj.
Printempo alvenas, vi ne kaŝas vin
inter herboj, sur petaloj vi dancas.
Kun viaj flugiloj, vi ĉiam inspiras
la belecon de naturo, mi admiras.

Kelly Muteke (D.R.Kongo)



Am-aflikto

La frakasita koro ditirita de la
mondo.
La forlasita vivo en arbaro.
Vi iris de mi fora.
Mi iĝis malĝoja viro.
Mia amo por vi estis sincera.
Mi neniam pensis, ke, ĝi okazus.
La vivo malbela sen vi.
Ne estas plena de belaj surprizoj.
Vi iris de mi fora.
Mia koro suferis pro via foresto.
Mi nur volus diri al vi.
Malgraŭ tiu distanco ankoraŭ,
MI AMAS VIN.

La voĉoj de la stratinfanoj

La mondo forlasis nin.
Nia kontinento faligis nin.
Nia lando perfidis nin.
Ni ne scias, kien iri.
Sed la strato bonvenigas min.
Mi estas stratinfano.
Malproksimigita de la gepatra amo.

Ni uzas perforton.
 Endas ŝteli por postvivi.
 Drogiĝi por dormi.
 Koŝmaroj iĝas efektivaĵoj.
 Mi ĉagreniĝas de tiu vivo.
 Suferi sen fari ion malbonan.
 Travivi en stratoj.
 Sen nutraĵo, sen lerni.
 Per la helpo de Dio,
 Ĉio boniĝos!

Yohanes Manhitu (Indonezio)



Kuri kontraŭ la tempo

La tempo flugas samkiel sago
 glitanta el la arko tute sen zorgo,
 sen hezito, des malpli bedaŭrovorto.

Mi rigardis la hieraŭon, kiu malaperis;
 mi ĝuas la hodiaŭon plenan je mirakloj;
 mi atendas la morgaŭon esperoplene.

Kiu estas tiu, kiu povas bremsi la tempon?
 Kiu estas tiu, kiu libere decidas la momenton?
 Ĉu ne nur la Ĉiopova, kiu posedas la
 potencon?

Nun mi devas fiksi la paŝojn por marŝi
 morgaŭ
 ĉar mi ne volas maltrafi tion, kio
 preterpasadas.
 Jes, tio, kio neniam zorgas. Ĝi estas la tempo.

Pluvo kaj espero neniam velkaj

Hodiaŭ sunlumas kvankam ne varmiĝas.
 La suno venis, sed ŝajne ne plenbrilas;
 Ĝi donas sunlumon, sed ne tutkore,
 dum tiu ĉi jaro, jaro malseka.

Ĉiu jaro havas sian propran formon
 kaj la ĉi-jara formo estas malsama.
 Se ne dum la nokto, certe dum la tago,

ni vidos pluvon kaj sentas malvarmon.

La grundo malsekiĝas, neniam sekiĝas;
 la folioj estas verdaj, neniam flaviĝas.
 Ne estas tempo por kultivi kampon,
 maizo kaj rizo ne plenigos grenejon.

La pluvo ne ĉesas, ni ne eliras;
 manĝi kaj trinki, ni daŭrigas.
 Esperu, ke manĝaĵo ne malpleniĝos
 por ke ni ĉiuj pasigu monaton.

Ĉiu jaro havas sian propran naturon,
 homoj ne havas elekton,
 sed posedas cerbon por serĉi vojon
 por ĉiam ĝoji dum ili havas vivon.

Konfidu ni al espero neniam velka
 kaj tenu firme la eternan promeson,
 plifortigu fidon kaj akriĝu intelekton,
 ni povos savi nin en tempo malfacila.

Noemuti, Okcidenta Timoro, marte 2011

Ĉiutage amo salutas

Ne ekzistas poemo jam perfekta
 por priskribi la majeston de amo.
 Kaj amo ne estas vorto, kiu
 elvapiĝas el la buŝo de forgesemulo.

Amo ĉeestas en ĉiu lingvo.
 Kvankam ulo regas mil dialektojn,
 neniun garantio, ke li estas vera amanto.
 Am-lingvaĵo ankoraŭ ne estas ago!

Mi ne intencas argumenti pri amo
 ĉar amo ne estas argumentoj.
 Kaj kvankam nun mi konversas,
 ni diru, ke mi provas kompreni.

La universo estis kreita kun amo;
 homoj ĉeestas kiel fruktoj de amo.
 Ĉiu nova tago alvenas pro amo;
 kaj por ĉiu kreitaĵo estas amo.

Pablo Milanés

Mi ja ne petas

Per blua stelo
el ĉielo ne regalu min.
Mi nur deziras
vian lumon ĉirkaŭ mi sen lim'.

Mi ja ne petas
ke, por ami, vi subskribu dek paperojn, ne!
Mi nur deziras
ke ni ĝuu miajn karajn birdojn dum promen'.

La pasintaĵojn ja ne forneos mi;
estontaĵoj alvenos laŭ kutim'.
Kaj en la nuno, jen mi fajfas pri homoj
kiuj ĉiam klaĉos pli.

Plenigu nepre
ĉiun minuton per motivoj por spiradi plu.
Min ne komplezu,
ne babilu, ne rifuzu nun.

Per blua stelo
el ĉielo ne regalu min.
Mi nur deziras
vian lumon ĉirkaŭ mi sen lim'.

Tradukis



Liven Dek (Hispanio)

Fernando Pessoa

Sonĝe fojfrapas
Sonĝe fojfrapas min tristo
sed min konsolas l' ekzisto
de land' , eĉ se por moment' ,
kie l' feliĉokonsisto
estu plena de kontent' .

Tie oni denaskvivas
sen ajnvolu pri ajnsci' .

En tia viviluzi'
mort' kaj renask' sin kultivas
laŭ temp' sen homa konsci' .

Kaj la sento kaj l' deziro
delongĉesis en ĉi tero .
Amo tie alispecas ,
kien mi metas kun vero
min sen pensoj kaj sen diro .

Oni ne sonĝas nek vivas :
Senfinas naŭva pleno .
Ŝajnas ke oni revivas
laŭ kia dolĉa sinteno
en ĉi malebla ĝardeno .

Elportugaligis



Wélington Rocha
(Brazilo)

El Ĉina Antikva Poezio

Wei Yingwu (Tang-dinastio)

Okcidenta rivereto ĉe Chuzhou

mi amas nur sovaĝajn herbojn ĉe rivero,
arbare oriolejoj trilas en vespero.
printempa tajdo ŝprucas, hasta pluvo falas,
boato drivas kaje ĉar sen pasaĝero.

Cui Hu (Tang-dinastio)

Skribita en Vilaĝo Suda de la Ĉefurbo

Hodiaŭ pasintjare
apud ĉi pordo
mi vidis ke vi konkuris
kun brilruĝaj persikfloroj
per la ĉarm-prezento

Hodiaŭ kurantjare
apud ĉi pordo
de ĉi tie vi forkuris
do ridas nur persikfloroj

en printempa vento

Elĉinigis



Ardo (Ĉinio)

Yuan Haowen (1190-1257)

*Drasta pluvo frapas novajn
lotusojn*

—laŭ melodio *Minora sankta muziko*

1.

Folioj verdaj ĵetas densan ombron,
vidiĝas pavilonoj sur la lago,
ĉi tie regas friska la aero.
La granatuj' ekfloras kun aromatako,
en la prosper' de flora ruĝo.
Hirund' kaj ĝiaj idoj flugas kun leĝera grako,
cikadoj laŭte ĉirpas sur salikoj altaj.
Dum drasta pluvo
pluvperloj ja disverŝas en ĥaos' per frapo
sur novajn la lotusfoliojn kun bat-krako.

2.

La homa vivo daŭras efemere.
Ne lasu bonan tempon
kaj belan pejzaĝon forflugi ŝtele!
Malbona sorto nia estas destinita
jam en antaŭa vivo vere,
ne penu per plenforto vane.
Plibone kantu ĉagrenpele
kaj drinku ĝoje kun amikoj
ĝis ebriiĝo jen prefere.
Ignoru kiel lun' kaj sun' alternas
navede kaj libere.

Yang Guo (1195-1269)

Lotussem-kolektantino

—laŭ melodio *Ruĝa persikfloro*

1.

Super l' urbo pendas nebulfumo
kaj malklaras akvo de l' rivero.
Belulino zumas kanton en boato.
Ofte mi memoras, ke ni kun sincero

renkontiĝis ĉe la silk-lava lago.

Inter ni nun staras la tri-laga sfero,
mi rigardas sopireme vane al la ĉielo.
La belino diras kun rideto tra l' aero:
“Ni similas al lotus-rizomo, kiu povas
ja rompiĝi, sed nin ligas ĝiaj fibroj sen
ŝancelo.

2.

Post kolektad' de lotussemoj
ŝi remas boateton en vesper'.
Helverda jupo ŝia krispiĝas en venta pel'.
Muziko biva tiras larmojn el
okuloj ŝiaj pro sopiroal reveno
de ŝia edzo el la foro.
Jam lotusfloroj fadas ĝis koloro
malhela, sed el li mesaĝet' nenia
atingas ŝin kun maltrankvila koro.
Rigardas ŝi al la malvarma ĉiel':
ambirdoj ruĝaj kaj ardeoj blankaj
jen pare flugas en krepusk-hel'.

Elĉinigis



Vejdo (Ĉinio)

Ĉineske

Yi Qiao (ĉino en Germanio)

La verdstelo

—laŭ ĉinesko *Luno super l' Okcidenta Rivero**

I.

La pensoj belaj
en beletra ĝarden'.
Ili floradas laŭ ĉen'
sub zorga subteno.

Por nia kulturo,
ĉiuj strebas kun pen'.
La verdstelo el Eden'

